


# KOSMOS

Revuo de Martinus-Instituto



© Martinus Institut 1981

martinus.dk

*Simbolo n-ro 18. La sortoarkoj de la viva estulo*

N-ro 2, 2023

Esperanto

## **Enhavo**

Klarigo de Martinus pri Simbolo n-ro 18. La sortoarkoj de la viva estulo.....	2
La kreado de la konscio .....	3
Tri homtipoj en la kreado de “la bildo de Dio” sur la tero.....	10
La monda ŝtato.....	16
Rezolucio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio .....	21
Informado pri la Martinus-instituto .....	23

## Klarigo de Martinus pri Simbolo n-ro 18. La sortoarkoj de la viva estulo

1. La blanka triangulo kun stelforma kruco ĉirkaŭe simbolas la vivan estulon. La oranĝkolora kaj violkolora figuroj ĉirkaŭ la stelforma kruco, kiuj estas enkadrigitaj de la du blankaj vertikalaj strekoj, montras ĝian nuntempan fizikan teran vivon. Tie la viola koloro esprimas nur la kosman strukturon de la estulo, dum la oranĝkolora figuro esprimas ĝian fizikan strukturon. Preskaŭ en la mezo de la bildo ni vidas du blankajn horizontalajn strekojn. Ili enkadrigas iujn longformajn kvarangulajn oranĝkolorajn figurojn. Tiuj simbolas la fizikajn terajn vivojn de la estulo. La blankaj figuroj inter ili simbolas ĝiajn spiritajn vivojn inter la fizikaj vivoj. Kune tiuj figuroj sekve esprimas la principon de renaskiĝo aŭ reenarkiĝo de la estulo. La tera vivo, kiu estas markita ĝuste super la stelo, estas ĝia nuntempa tera vivo. Ni vidas, ke de la blanka triangulo en la stelo, alivorte de la mio de la estulo, deiras iuj oranĝkoloraj kaj blankaj radioj. La oranĝkoloraj radioj esprimas kunligon inter la estulo kaj ĝiaj fizikaj teraj vivoj aŭ enkarniĝoj, kaj la blankaj radioj esprimas kunligon kun ĝiaj spiritaj vivoj inter la fizikaj teraj vivoj. La flava figuro malsupre maldekstre esprimas la estintecon de la estulo, kaj la verda figuro malsupre dekstre esprimas ĝian estontecon. Supre en la simbolo ni vidas sistemon de violkoloraj duoncirkloj aŭ arkoj. Tiuj arkoj aŭ cikloj estas la samaj, kiujn ni konas de la eternokorpo de la viva estulo (simbolo n-ro 16). Ĝiaj ĉiutagaj agoj aŭ konduto formas ilin. Ili estas la elsenditaj kaj revenantaj sortoarkoj de ĝia konduto. Ili enhavas la efikojn de la agmaniero de la estulo al si mem, al siaj ĉirkaŭuloj, siaj kunestuloj. Ili estas la efikoj de ĝia normala aŭ nenormala vivmaniero, ĝia amo aŭ senamo, ĝia pardono aŭ ne pardono de maljusto rilate al ĝia proksimulo.

Tiuj revenantaj sortoarkoj aŭ sortocikloj ne estas same grandaj aŭ same efikaj. Etaj malgravaj agoj en la konduto donas nur konforme etajn kaj malgravajn efikojn, same kiel grandaj kaj profundaj influoj al la vivtravivado aŭ konduto de aliaj estuloj donas konforme grandajn kaj profundajn influojn aŭ efikojn en la konduto aŭ sorto de la estulo mem. Tiel la ĉiutagaj agoj aŭ konduto de la estulo fariĝas amaso da grandaj kaj etaj sortoarkoj aŭ sortocikloj, grandaj kaj malgrandaj spertoj de malagrablo, grandaj kaj malgrandaj feliĉaj okazaĵoj. Tio okazas tute laŭ tio, ĉu en la menciita ĉiutaga konduto la estulo agis kun malfeliĉigaj sortoefikoj aŭ feliĉigaj sortoefikoj al sia proksimulo, kio signifas al ĉiuj vivaj estuloj, kun kiuj ĝi havis kontakton.

Sed tiuj sortoarkoj estas diversaj ne nur laŭ pli aŭ malpli profunda efiko en la sortoformado de la estulo. Ili reprezentas ankaŭ tre diversajn ekzistotempojn. En la simbolo ni vidas, ke iuj sortoarkoj aŭ sortocikloj finrealiĝas en la sama tera vivo. Sed aliaj sortocikloj finrealiĝos nur en la sekva vivo, ankoraŭ aliaj en la postsekva. Kaj iuj havas ankoraŭ pli longan ekzistotempon kaj finos nur en la kvara vivo post tiu, en kiu ili aktiviĝis pro la konduto de la estulo. En sia nuntempa fizika tera vivo la estulo do per sia konduto kaj siaj agoj, siaj rilatoj al aliaj vivaj estuloj, formas sian sorton por la unuaj estontaj teraj vivoj. Same la nuntempa tera vivo de la estulo certgrade estas formita kaj karakterizita de ĝia ĵus pasinta fizika tera vivo.

La tera vivo de ĉiu estulo estas do bazita sur ĝiaj sortoarkoj de antaŭaj vivoj kaj sur sortoarkoj, kiujn ĝi aktivigas en sia nuntempa vivo. El ili iuj finas sian ciklon en la sama vivo, kaj aliaj sortoarkoj finiĝos nur en venontaj teraj vivoj. Tion ni simboligis supre en la simbolo. Tie ni vidas, kiel la nuntempa vivo de la estulo (markita supre en la figuro per la mio kaj la stelo) estas kunligita kun sortoarkoj, kiuj eniros en ĝiajn estontajn vivojn. En ĝia nuntempa vivo la sorto de la viva estulo sekve estas multe pli profunda fenomeno, ol la homoj ordinare komprenas. Ankoraŭ nuntempe la estulo do pli aŭ malpli vivas en siaj estintaj kaj estontaj vivoj krom en sia nuna vivo. La sortoformado de la estulo sekve havas tian amplekson, ke neniel eblas fini ĝin en unu tera vivo, sed nur dum pluraj vivoj. Do ne troviĝas absoluta morto inter la fizikaj teraj vivoj. La tiel nomata "morto", kiu finas ĉiun fizikan vivon, sekve estas nur iluzio. Se ĝi vere ekzistus kiel absoluta morto,

ĉia vivo estus maleblo, ĉar per tio ĉiu vivkondiĉa ciklo komplete neniĝus iom post iom, senkonsidere ke neniam ajn povus estiĝi ia ajn movo kaj sekve ankaŭ ne ia ajn ciklo. Kaj sen ciklo absolute ne ekzistus ia ajn formo de vivo. Absoluta "nenio" necese ekzistus tie, kie nuntempe la eterna vivrivero de la universo malkovras la brilabundon de Dio.

Traduko Ib Schleicher el dana originalo, Det Evige Verdensbillede 2, symbol nr. 18, Det levende væsens skæbnebuer



## La kreado de la konscio

### Martinus

#### 1. La granda demando

Kion do ni vidas, kiam pluvas kaj neĝas, kiam fulmas kaj tondras, kiam la akvo fluas al la malaltejoj kiel riveretoj kaj riveregoj, kiam malvarmo, frosto kaj mallumo kreas vintron, kaj kiam la lumo kaj varmo de la suno kreas someron kaj rekreskigas la vivon? – Kio do okazas, kiam la ŝtormo kuregas tra la mondo, kiam okazas ciklonoj, inundoj kaj tertremoj? – Kio do okazas, kiam la grenkampoj dum la somera tago ondadas en la brizo, kaj la flora herbejo sendas sian abundon da odoroj kaj koloroj al la vivantaj estuloj, kaj la foliaraj haloj de la arbaroj eĥadas la laŭdokantojn de miloj da birdogorĝoj glorantaj la vivon? – Kion do ni vidas en la frostiĝintaj maroj, eternaj glacio kaj neĝo de la polusaj regionoj? – Kion do ni vidas en la nekredebla superabundo da vegetaĵoj de la tropikoj? – Kion do ni vidas en la granda silento kaj neloĝateco de la vastegaj dezertoj kaj rokaj terenoj? – Kion do ni vidas en la lumantaj steloj de la nokto, ĝiaj sunoj kaj galaksioj? – Kion do ni vidas en la multaj diversaj bestospecioj, ilia vivmaniero, iliaj malfacilaj vivkondiĉoj, ilia ekzisto kiel nutraĵo por homoj kaj bestoj? Kion do ni vidas en la diversaj homaj rasoj, iliaj diversaj prezentiĝoj ekde primitiveco ĝis alta intelekto, ekde malamo ĝis amo? – Kion do ni vidas en iliaj militoj kaj sangoverŝadoj, iliaj torturoj kaj agoj de venĝo, iliaj envio kaj ĵaluzo? – Kion do ni vidas en la tre amemaj kaj humanaj homoj kaj en tiuj tre brutalaj, malhumanaj, kun mortigaj aŭ murdaj inklinoj? – Kion do ni vidas en la multaj malsanoj aŭ suferoj en multspecaj variaĵoj kaj la ĉagreno kaj spleno rezultantaj el ili, kiuj siavice kaŭzas memmortigojn? – Kion do ni vidas en la multaj diversaj malakordoj kaj malharmonioj inter homoj kaj ŝtatoj? – Kion do ni vidas en la formo de religioj, sektoj kaj konfesioj? – Kion do ni vidas en la formo de kolero, amareco kaj netoleremo? – Ĉu ne ĉio, kion ni vidas ĉirkaŭ ni, estas unu granda kaoso? – Ĉu ĝi ne estas miksamaso el la hazardaj kuntuŝiĝoj inter plej malsamaj fortoj? – Ja, ĉu tiuj intertuŝiĝoj ne estas plejparte fuŝkontaktoj, eksplodoj, kaŭzantaj detruon, morton kaj pereon? – Ja kio entute estas ĉio tio, kion ni vidas en la fizika mondo? – Ĉu vere havas ian sencon ĉiuj tiuj jen teruraj, jen bonaj fenomenoj? – Jes, ja ĝuste tiu demando estas al treege multaj homoj la fundamenta kaj plej brula, kiu ekzistas hodiaŭ, ĉar oni reale tute ne konas la respondon. Kaj kiam oni ne konas la respondon, oni ne povas ekvidi ian ajn sencon aŭ justecon en la ĉiutaga vivo, tio estas: en la sorto de la vivantaj estuloj.

## **2. La homoj estis antaŭdestinitaj al kredado**

Kial oni ne povas trovi la respondon de la tuta ĉiutaga amasego da diversaj fenomenoj aŭ okazaĵoj kaj principe de la malfeliĉaj sortoj de la homoj? – Estas vere, ke la religioj donis al la homoj ideojn pri ama Dio kaj pri la justeco en la mondo. Sed tio, kion donis la religioj aŭ iliaj originoj, ne estas analizoj, ne estas intelektaj klarigoj pripenseblaj kaj kontroleblaj de la homoj. Kiam la homoj estis en tiuj stadioj, kiam ili estis gvideblaj per la religioj kaj ties originoj, ili ne havis tian intelektan kapablon, kiam ili havas hodiaŭ. Ili tial ne kapablis fari iun ajn kontrolon de la predikadoj de la religioj. Ili havis nenian ideon pri tio, ke la kernaj punktoj de la religioj vere estas exploreblaj kaj kontroleblaj kaj tiel povos fariĝi vekiĝinta plenkonscia scio. Ke la mondosavantoj havis la religian scion, laŭsupoze estis pro tio, ke ili estis apartaj, sanktaj viroj rekte inspiritaj de la plej altaj fortoj, de dioj aŭ diaĵoj aŭ de la unusola vera Dio, same kiel la kredo je Jesuo Kristo grandparte estas bazita sur tio, ke oni perceptis aŭ fidis, ke li estas la solenaskita kaj eĉ karna filo de Dio. Ja tial li facile povis prezenti laŭdindan kaj aman kondukmanieron. Kaj pro tiu sama kaŭzo li ankaŭ povis havi scion pri la grandaj veroj de la vivo. Tiun staton oni supozis komplete neatingebla de ordinarnaj homoj. Tial ili devis kredi la religiojn kaj ties originintojn. Per siaj instinktoj kaj nesufiĉa intelekto ili estis ĝuste antaŭdestinitaj al kredado.

## **3. La kristanismo situis intelekte tro alte por siaj samtempuloj**

Estas tiel pri la homaro en ĝia infanaĝo, kiel estas pri neplenaĝaj infanoj. Ili bezonas kredi aŭtoritatojn. La neplenaĝaj infanoj kredas la aŭtoritatecon de siaj gepatroj, sed la homoj dum sia infanaĝo aŭ primitiva stato kredas la aŭtoritatecon de la mondoliborigantoj aŭ fondintoj de religioj. Ne eblis al ili mem trovi la vojon ĝis la solvo de la vivmistero. Sed la solvo, kiun la religioj povis doni al la homoj, tiamaniere ne estis solvo de la mondenigmaĵo mem. Ĝi estis nur gvidilo por la homa konduto kaj kiel oni rilatu al sia proksimulo kaj al la Dieco. Eĉ interne de la Kristanismo nur relative tre malgranda sciaro estis predikebla de Jesuo, ĝuste ĉar ili ankoraŭ ne havis tiun intelektan talenton, kiu povus transformi kredon en scion. Jesuo ne povis klarigi al la homoj pri ilia reenkarigaĵo, ilia specifa sortosolvo, ĉar ili ne havis tiusencajn demandojn. Ili kontentiĝis per simplaj, mallongaj respondoj aŭ kalkulrezultoj tiukampe. Klarigojn kun komplikitaj, intelektaj detaloj ili ne kapablis alproprigi. Ni vidas, ke eĉ hodiaŭ la predikado de Kristo ne estas komprenata. La kristanismo fondiĝis sur tute alia kondukmaniero ol tiu montrita de Jesuo. Kial? – Ĉar la kondukmaniero, kiun Jesuo predikis, kaj kiu estis la absolute vera Kristanismo, situis intelekte multe tro alte por esti komprenebla al la samtempuloj de Jesuo kaj de la sekvaj generacioj. Tial li ankaŭ anoncis, ke iam venos io instruonta al ili tion, kion ili liatempas ne komprenis.

## **4. “La Parakleto, la sankta spirito” kiel nova scienco**

Tiu instruonto estis “La Parakleto, la sankta spirito”. La sankta spirito ne estas persono, kiu venos en fizika formo, sed estas scienco, kiu povas kontentigi la intelektecon de la homoj. Spirito estas ĝuste la sama afero kiel pensoj kaj scio. Sanktaj pensoj kaj scio ja nur povas esti la absoluta vero pri la Dieco, la vivo kaj la estado rakontitaj en la formo de kosmaj analizoj de la universo. Tio siavice signifas sciencon pri ĉio, kio apartenas al la nocio de konscio, menso kaj spirito. Ĝi estas scienco pri la senmorteco de vivantaj estuloj kaj la ekzisto de la Dieco. Ĝi estas scienco pri la formiĝo de sortoj. Ĝi estas scienco pri la spiritaĵaj fenomenoj same kiel la fizika aŭ materiisma scienco estas scienco pri la fizikaj aŭ materiaj fenomenoj. Kiam tiuj du sciencoj egalrangiĝos, la mondpaco komencos montriĝi, kaj la homaro fariĝos unu gregoj kun unu paŝtisto, kiel Kristo heroldis. La homoj konsistigos unu solan ŝtaton, en kiu ĉiuj nunaj ŝtatoj aŭ regnoj de la mondo estos unuigitaj, kaj la tero fariĝos unu mondo, en kiu loĝos justeco.

## **5. La kosma scienco kaj ĝia misio**

Per la spirita kampo de tiu scienco la homoj ricevos respondon de ĉiuj tiuj demandoj pri tio, kion ili vidas ĉirkaŭ si, kiel ni menciis antaŭe. Per tiu ĉi scienco aŭ la sankta spirito la homoj do ekvidos la kaŭzon kaj la intencon de ĉio, kio okazas ĉirkaŭ ni. Ĝi instruas la homojn mem rigardi la vivon kaj travivi tion, kion ĝi diras, aŭ vidi, kia dia revelacio estas la menciita vivo sur la tera, fizika nivelo de

ekzisto. Tra tiu revelacio la vortoj de Kristo kaj la grandaj frazoj de la Biblio fariĝas sciencaj rezultoj. Ni do vivas en epoko, kiam la religia vivo de la homoj transiras el afero de kredo al afero de scio. Ĝi transiras el kampo de instinktoj kaj sentoj al kampo de intelekto kaj intuicio. Ĝi transiras el sfero neintelektala kaj primitiva al sfero altintelektala kaj suverena.

## **6. La respondo de la multaj demandoj**

Kia do estas la respondo, kiun donos tiu scienco al ĉiuj el la menciitaj demandoj pri ĉio tio, kion ni vidas? Estas nur unu sola granda respondo, kaj ĝi estas tiu, ke “Dio kreas konscion”. Ĉiu unuopa moviĝo, ĉiu unuopa manifestado de koloro, sono, lumo aŭ mallumo, ĉu mezkosmaj, mikrokosmaj aŭ makrokosmaj, estas absolute ne malhavebla ĉenero en tiu kre-procezo de la Dieco. La tuta nuna stadio de la terglobo estas laborejo de la Dieco por la kreado de la homo laŭ lia bildo kaj simila al li. Ĉio, kio entute materi-nivele estas alirebla aŭ videbla al niaj fizikaj sensiloj, estas moviĝado. Tiu moviĝado ne povas ekzisti krom estante transformado. Transformado siavice estas kreado. Tiu kreado estas logika. Ĉio, kion ĝi kreas, en sia finrezulto estas utila kaj bona al vivantaj estuloj. Kiam ĉi tie temas pri moviĝado, estas ne nur tiu movado, kiu konsistas el la transporto de objekto el unu loko al alia, sed ankaŭ la moviĝado, kiu okazas en la elementoj, el kiuj la objektoj konsistas. Ĉio, kion ni kredas firma materio, ĉu ŝtono, granito, marmoro, fero, ŝtalo, oro, arĝento aŭ simile, ne estas esprimo de moviĝado alirebla de niaj fizikaj sensiloj. Sed en tiuj materioj ekzistas kiel sciante kolosaj specoj de moviĝo. Do ekzistas nenia ajn materio alirebla por niaj fizikaj sensiloj, kiu ne konsistus el moviĝoj; reale do ĉio estas moviĝado. Ĉiuj kreitaj objektoj efektive estas nur kombinoj de diversspecaj movoj. Ĉiuj kreitaj objektoj do estas kombinitaj specoj de moviĝo. La kapablo kombini la movospecojn do estas la sama afero kiel la krea kapablo.

## **7. La sola vera Dio kiel origininto de ĉio en la universo**

Sed la krea kapablo neniel povas esti io alia ol ilo de kreanto. Kiamaniere la krea kapablo povus ekzisti per si mem? – Ĝi per si mem ne kapablas pensi, nek plani. Do malantaŭ la krea kapablo ekzistas ĝia origininto. Tiu origininto, kiu tiel estas la origino de ĉiuj ekzistantaj kreaĵoj, absolute nur povas esti identa kun la sola ĉiopova, ĉioscia kaj ĉioama estulo, kiun ni lernis nomi “Dio”. Dio do estas malantaŭ ĉiuj specoj de movo, gvidas kaj kondukas ĉion, kio entute ekzistas en la formo de movado aŭ kreado. Kiam ni vidas rokojn, montojn, montetojn kaj valojn, riverojn, lagojn kaj marojn, ili ĉiuj konsistigas specojn de movado aŭ kreaĵojn konstruitajn per aliaj movospecoj. Kiam ni vidas la florantajn herbejojn, la verdajn arbarojn, la flavajn grenkampojn, la maturajn fruktojn kaj aliajn plantojn, tiam denove temas pri movokombinoj konstruitaj el aliaj movospecoj. Tiuj movospecoj siavice plenumas kombinadon de movospecoj, kiuj kondukas al la vegetajaj vivoformoj pluen ĝis la bestaj vivoformoj. La fizikaj organismoj de la bestoj kaj la homoj ĉiu unuope ankaŭ estas nur kombino de movospecoj, konstruitaj el aliaj vivoformoj. Tiujn movospecojn ni nomas organoj, ĉeloj, molekuloj, atomoj ktp.

## **8. La homo laŭ la bildo de Dio kaj simila al li**

La konstruo de la organismo de la vivantaj estuloj ja estas logika kreado. Kaj logika kreado neniel povas ekzisti sen vivanta origino. Ni vidas, ke tiu kreado estas pelata ĉiam pluen al certa celo. Tiu celo do estas la plenumiĝo de la dia volo aŭ intenco, kiun laŭ la Biblio Dio esprimas per la vortoj: “Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni”. Ĉiom de la moviĝoj, kiu okazas ĉirkaŭ ni ĉi tie sur la tero kaj ekstere en la universo, do estas kreado. Estas la Dieco, kiu rekreas ĉian vivon por ke ĝi estu en lia bildo. Tiu bildo estas la totale perfekta homo, do la homo, kiu per sia evoluo liberigis sin pri ĉiuj bestaj tendencoj, la homo, kiu ne povas vundi aliajn estulojn kaj ankaŭ mem ne estas vundebla. Estas la homo, kiu neniel ajn povas ekkoleri. Estas la homo, kiu amas la Sinjoron sian Dion super ĉio kaj sian proksimulon kiel sin mem. Estas la homo, kiu pardonas sian proksimulon ne nur sep fojojn tage, sed ĝis sepdekoble sep fojojn tage.

## 9. La konscio de la planta estulo

Ke ĉi tiu kreaĵo estas realaĵo, ni povas observi rigardante la grandan kreoprocezon ĉirkaŭ ni. Antaŭ la regno de plantoj ni vidas la regnon de mineraloj. Ni vidas la movospecojn pluevolui ĝis vegetaĵaj movospecoj, plantaj organismoj. En tiuj vegetaĵaj movospecoj aŭ plantaj organismoj ni renkontas la unuan burĝonantan formon de tio, kion ni nomas “konscio”. Tiu konscio ankoraŭ estas tiel malforta, ke ĉiuj funkcioj de la planta mio estas aŭtomataj. Tiu aŭtomatecon akcelas la unua baza energio, la instinkto. La planto ankoraŭ ne povas senti aŭ travivi per vekiĝinta plenkonscio je la fizika nivelo. Ĝi nur povas “senteti” plezuron aŭ malplezuron. Kio estas tiu plezuro aŭ malplezuro, pri tio ĝi havas absolute nenian ideon. Sed travivinte dum jarmiloj nur plezuron kaj malplezuron, ĝi ekhavas la kapablon proprasence inklini al la plezuro. Apenaŭ ekzistas iu vivanta organismo, al kiu okazas tiom da detruo kaj dismembrigo, kiel ĝuste la planta organismo. Dum jarmiloj influas ĝin varmo kaj malvarmo, sekiĝo kaj tromalsekiĝo, krom ke ĝin ĉiam denove detruas bestoj aŭ homoj, kiuj bezonas ĝian organismon kiel nutraĵon, kiel vestaĵojn, kiel konstrumaterialon ktp. Tiu giganta procezo de dismembrigado, kiu okazas al la plantoj, estus vera infero por la plantaj estuloj, se ili povus senti doloron kaj suferon kiel la besto kaj la homo, sed tion ili absolute ne povas. Ilia fizika organismo ankoraŭ estas tiel malmulte evoluinta, ke ili ne povas senti doloron kaj suferon tiusence, kiel la besto kaj la homo povas senti tion. Kiel jam menciite, la planta estulo nur povas senteti la doloron kiel ian malplezuron. Sed tiu senteto, portata de ĝia instinkto, estas en kontakto kun ĝia antaŭenpelanta forto, la praavido, kiu ĉi tie agas favore al la antaŭenmovado de la planto for el la regno de beateco.

## 10. La planta estulo estiĝas

Travivinte la kulminon de beateco en antaŭa spiralo, la planto ja sopiras la malon de beateco. Tial ke beateco estas la kulmino de plezuro, la malo de beateco tiel estos malplezuro. Tial la malplezuro ne estas tiel drasta al la planta estulo, kiel estas korpaj lezoj al bestoj kaj homoj. Ĝis ne neglektinda grado la stato de malplezuro efektive en la komencaj stadioj de la planto estas formo de plezuro, kiu kompreneble fariĝas ĉiam pli veraj doloro kaj sufero, dum la planto proksimiĝas al la besta stadio de evoluo. Kaj komencas ekesti io simila al protektaj aŭ defendaj tendencoj, kiuj kondukas la estulon ĉiam pli proksimen al la stadio de la besto, kaj kiuj estas bazitaj sur tio, ke la estulo devas mortigi por vivi. Ni vidas en la karnovoraj plantoj, kiamaniere tiu principo komencas disvolviĝi. En tiu estulo ni ankaŭ vidas la komenciĝantan evoluon de tiuj fenomenoj, kiuj en la besto fariĝis plene evoluintaj digestaj organoj. Kaj en tiu stadio la estulo ne plu estas planto, sed fariĝis multe pli altnivela estulo, fariĝis besto.

## 11. La konscio kaj la kondutmaniero de la besto

La konscion kaj la kondutmanieron de la bestoj ankoraŭ altgrade pelas la instinkta kapablo, sed ĝi nun evoluigis la fizikajn sensojn. Ĝi povas flari, gustumi, aŭdi kaj vidi. Ĝi tial havas ne nur antaŭsentan konscion, sed nun havas vekiĝintan, fizikan plenkonscion. Ĝi travivas realece aŭ rekte la fizikan realon ene de tiu areo, en kiu ĝiaj sensoj kapablas reagi. Sed la vivo tie estas malfacila. Ĝi troviĝas en la zono de la mortiga principo. Ĝi devas mortigi por vivi. Ĝi devas sin defendi kontraŭ aliaj bestoj, kiuj deziras ĝian organismon kiel nutraĵon. Tuta oceano da bestoj bezonas la organismojn de aliaj bestoj kiel nutraĵon, ĉar alie ili ne povus vivi en la fizika nivelo. Tial ĉiuj bestoj havas ian defendilon, pere de kiu ili iagrade povas defendi sin kaj siajn idojn kontraŭ aliaj bestoj, kiuj persekutas ilian vivon. Iuj bestoj povas defendi sin per sia kapablo kuri, aliaj povas defendi sin per ruzo kaj sagaco, ankoraŭ aliaj estas iagrade protektitaj per tio, ke ilia aspekto similas la ĉirkaŭaĵojn, en kiuj ili moviĝadas, kaj estas tiel kamuflitaj, ke iliaj malamikoj ne facile ekvidas ilin. Do estas sovaĝa lukto inter la bestaj estuloj. La estuloj tiunivelaj estas persekutataj de aliaj estuloj, kaj la estuloj mem persekutas aliajn estulojn. La besta regno tiusence estas zono de malamo kaj mallumo. Ĉi tie ĉiu por si mem estas la plej kara. Se la besta instinkto de memkonservado ne estus bazita sur tiu principo, ĝi tre rapide pereus. Ĉi tie ekzistas nur la gepariĝa amo, kiu koncernas ekskluzive la geedzecon kaj la idaron. Ekster tiu mensa sfero reale ekzistas nur militejo. Ĉi tie ili ĉiuj devas havi ĉiujn sensojn streĉitaj por ŝtele moviĝadi nevidataj, por povi defendi sin kontraŭ siaj

malamikoj aŭ superruzi ilin. Se ĝi volas konservi sian fizikan vivon, ĝi do devas batali por ĝi, ĉar ĝi devas mortigi siajn malamikojn aŭ alimaniere sendanĝerigi ilin.

## **12. La besto kaj la influoj sur ĝin**

Ĉi tie ni klare vidas, ke la surtera fizika mondo de la bestoj estas unu granda procezo de kreado, ĝi eĉ estas la laborejo de la origino de tiu kreado, la eterna Dieco. Kiel eblus al la senkonscia planta spirito, veninte ĵus el la regno de beateco, kaj tie vivinte en siaj memoroj el pli frua spiralo, sed ne havante iun ajn konscion aŭ senskapablon per kiu havi travivaĵojn ekster la regno de beateco, akiri la antaŭsentan kapablon, se ĝi ne estus influita de klimataj cirkonstancoj dum jarmiloj, de pluvo kaj seko, malvarmo kaj varmego, ŝtormo kaj kvieto, griza vetero kaj sunbrilo, nokto kaj tago, krom de la dismembrigaj procezoj de bestoj kaj homoj al ĝia organismo. Kiamaniere tia spirita estulo povus eksenteti ion pri iu ekstera mondo, se ne ĝuste okazadus al ĝi ĉiuj tiuj klimataj kaj malmildaj influoj? – Tute nepenseble estus doni al ĝi la unuajn elementajn konsciigajn influojn. Se ne ekzistus la eksteraj influoj, ĝia instinktokapablo kaj sekve ĝiaj sentet-kapablo kaj komenciĝantaj vivfunkcioj neniel povus okazi. Kaj se ne okazus la ĉiam pli fortaj influoj, ne ebligus konduki ĝin ĝis la besta stadio. Se la estulo ne venus en stadion, kie ĝi devos travivi timon aŭ angoron, kio do inspirus ĝin evolui aŭ lertigi sin pri fizika estado? – Se ĝi ne ricevus suferadon, ĝi ja ne povus evoluigi sentadon. Kiel ĝi povus percepti bonfarton? – Kiel ĝi ekhavis la deziron atingi bonfarton? – Kaj kiel ĝi do akirus tiujn talentojn aŭ dispoziciojn aŭ kapablojn, kiujn evoluigas la penado por atingi bonfarton? – Kiamaniere ĝi ekhavis inteligenton, se ne daŭre vigligus ĝin la timo de atako kaj la neceso superi siajn malamikojn? – Ni vidas, ke la krudaj kaj malfacilaj kondiĉoj, sub kiuj la besto devas vivi, estas absolute necesaj. Sen tiuj ĝi ekhavis nek senton nek inteligenton. – Kiamaniere ĝi do iĝus altintelekta homo en la bildo de Dio kaj simila al li?

## **13. La polusa transformiĝo de la maskla kaj femala estuloj**

En la besta regno ni vidas la unuajn konsciajn ecojn trejniĝi. Sed la sento kreata ĉi tie ankoraŭ estas plejparte la malamo. Kaj tiu inteligento, kiu ĉi tie komencas evoluiĝi, estas precipe utiligata serve al tiu malamo. Kaj tio ja ne servas por krei pacon, sed eĉ pli grandan militon. Estas facile videble, ke tia estulo ne estas finita, ne estas en la bildo de Dio. En ĝi la polusa konstelacio estas ĉe sia kulmino inter masklismo kaj feminismo. Tio do signifas, ke ĉi tie la maskloj kulminas kiel viraj estuloj kaj feminaj estuloj kulminas kiel inaj estuloj. La estuloj tiel prezentiĝas ĉi tie kun la plej granda kontrasto inter siaj kunnaskitaj du polusoj. Kaj ili ne sukcesus evolui pli malproksimen ol ĝis tiu senhumaneca besta sfero, se la praavido profunde en la superkonscio de la besto ne akcelus daŭran nekonscian sopiron al ĉiam pli da lerteco aŭ perfekteco en la estonta stato de la estulo. Tiu funkcio de la praavido estas akcelata en la konscio de la estulo per tio, ke la stagnanta poluso ekevoluas. Tio do signifas, ke la femala poluso en la vira estulo kaj la maskla poluso en la ina estulo komencas rimarkigi sin en la konsciado de la estulo. Kaj ekde tiu stadio la estulo ne plu estas centprocente virseksa aŭ centprocente inseksa estulo.

## **14. La transformiĝo de la besto**

Kun la evoluo de la kontraŭa poluso komenciĝas tute nova intereso-sfero, kiu reale tute ne koncernas la interesosferon de gepariĝo aŭ geedzeco. Tiu nova interesosfero estas la komenciĝanta burĝono de homa konscio. Tio do konsistigas la tiel nomatan “homecon” de la “homo”, dum la ordinara poluso daŭre konsistigas la tiel nomatan “bestan konscion” en la homo. Kaj kun la alveno de tiu stadio la besto ne plu estas pure kaj propre “besto”, sed ĝi ankaŭ ne estas pure kaj propre “homo”. Tia estulo estas la hodiaŭa ordinara terhomo.

## **15. La unuaj homaj formoj de religieco estis bazitaj sur la mortiga principo**

Tiu komenciĝanta homa konscio en la homo stimulas unue la religian principon. Ĝi kondukas la homojn al senteto de la ekzisto de pli altaj spiritaj estuloj aŭ dioj. Ĝi komencas formi moralon. Tiu moralo estas ilia propra kondutmaniero en idealigita formo, ĝi estis la pinto de tio, kion ili povas imagi sur tiu evolustadio, en kiu ili dumtempe troviĝas. Ĉar la besta vivoformo daŭre estas la

reganta dum la unuaj, burĝonantaj stadioj de la polusa transformiĝo, nature ĝuste tiu vivoformo devis esti idealigita. Tial fariĝis el la mortiga principo la idealo. Tiu religia principo omaĝas la kultadon de herooj. La plej fortaj fizikaj venkintoj, kiuj povis meti finon al la malamiko, disrabi kaj dismembrigi lin aŭ fari el li sklavon, estis la granda religia idealo kaj moralo, ĉar oni opiniis, ke nature ankaŭ la dioj aŭ la plej altaj estuloj vivas tiamaniere. Kaj kiel eblus havi aliajn imagojn? – Ankoraŭ ne estis en la psiko de tiuj estuloj vera amo. La potenco kaj la kapablo subpremi aliajn estulojn estis la kulmino de la idealo kaj la vojo al favoro de la dioj. Ja ĉu ne estis ĝuste tiel, ke necesis ne nur esti bona mortiganto por veni en Valhalon (la ĉielon de la vikingoj), sed necesis ankaŭ mem esti mortigita por veni en tiun sangan paradizon?

## **16. La genia militkapablo de la homoj**

Nun la homoj iom pli progresis en la evoluo. La religia principo iom ŝanĝiĝis favore al humaneco. Sed la evoluo de milito ankoraŭ ne haltis. La homa kapablo, la inteligento, nun kapabligis la homojn multoblige sian ankoraŭ bestan kaj mortigan naturon tiel, ke ili povas uzi milionojn da ĉevalpovoj el la granda energioceano de la naturo mem. Milionurbojn ili povas neniigi en sekundoj. Ili eltrovis kiel ekregi fortojn tiel gigantajn, ke la homoj per ili povas fari vundojn en la tera organismo. Per la efiko de tiuj fortoj sur la teran organismon ili povas estigi la pli-malpli mortigan aŭ kancerigan radioaktivecon. Militoj kaj mondmilitoj hantis la homaron, kaj timo de venontaj militoj ĉie floras. Sub giganta ekonomia premo oni okazigas la militarmadon kaj la kreadon de novaj mortigaj kaj dismembrigaj fenomenoj.

## **17. Diabla estulo aŭ diabla homo**

La alte evoluinta inteligento kaj la sekvanta el ĝi granda alproprigo de materia scio, kiun la homaro tiamaniere ekposedis, tute vere donis al ĝi grandajn bonojn en la materia kampo, sed ĝi ankoraŭ ne samgrade evoluis en la kampo de homeca pensmaniero. La genia, sed diabla militpreteco, kiun la materia scio kapabligis la homojn manifesti, provizore estas ilo nur por la besteca flanko de la homoj – ne por la homeca flanko. Tiu sendia, materia kaj besteca flanko de la homo kaŭzas, ke ĝi ankoraŭ ne estas “homo”. Kaj pro tio, ke ĝi estas gigante supera al la besto laŭ intelekto kaj laŭ mortigaj kaj dismembrigaj manifestadoj, oni ankaŭ ne povas nomi tiun estulon homo, laŭ kosma vidpunkto. Laŭ tiu vidpunkto ĝi ankaŭ ne estas esprimebla kiel “besto”. Ĝi estas esprimebla nur per tiu sama simbolo kiel tiu, per kiu la Biblio esprimis “la malbonon”, nome per la koncepto “la diablo”. La estuloj esprimas per sia tuta militema genieco tiun staton de konscio, kiu faras el sia origino estulon esprimeblan nur kiel “diablan estulon” aŭ “diablan homon”. Sed tiu psika stato ne estas riproĉebla al iu homo. Ĝi estas neevitebla stadio en la kreado de la homo en sia bildo fare de la Dieco. Dum tiu stadio la estulo akiras totalan kapablon disvolvi sian tutan egoistan konscion aŭ ĉion malbonan aŭ bestecan, kio ankoraŭ restas en ĝi. Sed la malbona manifestiĝo estas semo plantata, kies rikolton la estulo mem poste travivos kiel sian sorton. La rikolto kompreneble estos la sama semitaĵo, kiun oni semis. La sorto de la estulo do ĉi-okaze estos la rikolto de la malbona semitaĵo. Kaj tiu rikolto, kiu estas la frukto de tiuj suferoj, kiujn la estulo kaŭzis al siaj proksimuloj, do konsistos el tiu sama malfeliĉa sorto, kiun la estulo alportis al sia proksimulo.

## **18. La evoluo de la humana kapablo**

Sed la malfeliĉaj sortoj kreas novan kapablon, nome la humanan kapablon. La kapablon senti kompaton. Kaj ju pli tiu kapablo evoluigos, des pli granda estos la kapablo ne havi la koron por malbonagi kontraŭ aliaj vivantaj estuloj. Per la totala evoluo de tiu kapablo, tiom kiom ĝi fariĝis vera kaj absoluta amo al la proksimulo, la besteco en la homo malaperis. Nova kapablo nun aperas el sia latentaj stadio, nome la intuicia kapablo. La totala, konstanta disvolvo de tiu kapablo sub kontrolo de la volo estas tio, kio donas al la homo kosman konscion. Per tio ĝi iĝis la totale perfekta homo en la bildo de Dio. Ĝi vidas la universon per la okuloj de Dio kaj tiamaniere centprocente kontaktiĝas kun la konscio de Dio. Ĝi estas konscia pri sia propra senmorteco, ĝi estas konscia pri reenarkiĝo kaj karmo. Ĝi estas konscia pri la gvidado de la tuta universo, ĝi estas konscia pri la



spiritaj mondoj. Ĝi estas konscia pri Dio kaj la eterneco. El tiu estulo povas radii nur la bildo de Dio simila al li.

### **19. Ĉio estas treege bona**

Ni tiamaniere vidis, ke ĉiuj tiuj fenomenoj, kiuj ĉirkaŭas nin, ĉu bonaj aŭ malbonaj, vere estas bonaj, ĉar la estuloj pere de ili iam atingos la kosman konscion, kio signifas, ke la konscio de Dio eklipsas la estulon, kaj ĝi vidas nur Dion en ĉio kaj en ĉiuj, ĝi povas vidi nur, ke ĉio estas treege bona.

Kiam ĉio, kion ni tiel renkontas en la ĉiutaga vivo, same la feliĉajn kiel la malfeliĉajn sortojn, estas la fenomenoj, per kiuj Dio povas transformi la senkonsciajn spiritajn estulojn elirintajn el la regno de beateco al estuloj kontaktiĝintaj kun la konscio de la Dieco kaj tiamaniere fari el ĉiu el ili “la homon laŭ la bildo de Dio kaj similan al li”, ni ĉi tie nur povas konfirmi la eternajn vortojn, kiujn laŭ la Biblio esprimis Dio kreinte la mondon, nome tiujn ke “ĉio estas treege bona”.

### **20. Homoj, kiuj amas Dion super ĉio kaj sian proksimulon kiel sin mem**

Sed tiu ĉi-antaŭe menciita kreado de la Dieco neniam estos sukcesa, krom se la estulo utiligos tiun krekapablon, kiun la Dieco kreis por la homo. Ke ĝi devas lerni krei samspirite kaj sammaniere kiel Dio estas ja memkompreneblaĵo. Tio do signifas, ke la homo devas komenci revizii siajn kreadojn aŭ manifestadojn. Tiagrade kiom ĝi povas forlasi la malbonajn manifestadojn, malsimpation, netolerecon, malican kritikon, kaj antaŭ ĉio ekscitiĝemon, kolerecon, amarecon, envion, ĵaluzon ktp., tiagrade kiom la homo venkas la restaĵojn de sia propra besta naturo, tiagrade ĝi estas homo survoje antaŭen al la lumo, ĝi estas survoje por fariĝi kristosimila estulo. Ĝia neŝancelebla gvidilo estas la eterna ordono: “Amu la Eternulon, vian Dion, super ĉio kaj vian proksimulon kiel vin mem. Tio estas la tuta plenumado de la leĝo”.

### **21. Kion devas observi la nefinita homo**

La tera homo absolute nenion pli bonan povas fari ol traserĉi sin mem por vidi, kiuj restaĵoj de besta menso ankoraŭ restas en ĝia konscio. Vere estas, ke hodiaŭ multaj homoj havas pacon en la animo kaj ŝajnas havi bonan rilaton kun siaj kunhomoj, sed tio ne necese signifas, ke ne estus en ties mentalito aŭ kondutmaniero io, kio estas besta kaj tial pli aŭ malpli frue povos ŝiri tiun saman homon el ĝia paca dormeto de la ĉiutaga vivo. Multaj tiaj homoj helpas akceli la mortigadon de bestoj. Ne eblas bagateliĝi, ke tio estas malobservo de la kvina ordono: “Ne mortigu!” Partopreni mortigadon de vivantaj estuloj, kiam tio ne plu estas vivkondiĉo, signifas semi nenaturan morton kaj pereon en sian propran sorton. Multaj aliaj homoj, kiuj laŭ sia propra opinio ŝajnas farti tre bone, povas havi multajn nefinitajn flankojn, pri kiuj ili tute bone povus elkutimiĝi, sed ili tute ne pensas pri sia vivo. Oni vere povas plani kaj plibonigi sian estontan sorton aŭ sian venontan vivon kaj helpi al la Dieco transformante sin mem el la ankoraŭ bestaj tendencoj, kiuj kvankam ili eble ne estas tiom elstaraj, tamen estas sufiĉe grandaj por krei malfeliĉajn cirkonstancojn en onia estonta vivo kaj sekve suferajn epokojn dum la nuna, kiuj alie povus iĝi tiom lumaj kaj brilaj.

### **22. En la laborejo de Dio, kie estiĝas la plej grava artaĵo de la vivo**

Necesas do antaŭ ĉio rigardi aliajn vivantajn estulojn kiel artaĵon, pri kiu la Dieco agadas por doni al ĝi konscion. Necesas rigardi tiun kiel nefinitan tiagrade, kiom oni vidas tiun estulon disvolvi bestajn tendencojn. Tiam oni devas ekkompreni, ke ĝi ne povas esti pli perfekta ol tiu stadio, ĝis kiu la Dieco tiumomente kondukis ĝin. Se oni povas vidi la neperfektaĵojn de la estulo, tial estos malsaĝe koleriĝi pri tiu neperfekteco. Tiu kolero do estos maljustaĵo al tiu estulo, sed ankaŭ al la kreinto de tiu artaĵo, la eterna Dieco. Estos bone rememorigi sin, ke oni estas en la laborejo aŭ metiejo de Dio kaj vidas ĉiujn liajn nefinitajn artaĵojn, la multajn diversajn speciojn de vivantaj estuloj ĉi tie sur la tero, kiuj ĉiuj estas artaĵoj de Dio prilaborataj por ke ĉiu el ili fariĝu la plej granda artaĵo de la vivo, “la homo en la bildo de Dio kaj simila al li”.

*Dana titolo estas “Bevidstheden skabelse”. El libreto n-ro 14, La kreado de la konscio. Traduko Jens Stengaard Larsen*



## Tri homtipoj en la kreado de “la bildo de Dio” sur la tero

### Martinus

#### **1. La homaro povas ekstermi ĉion vivan**

La ordinara homo ne facile komprenas tiun malluman sorton, en kiu la homaro nuntempe troviĝas. Ni ja ne povas eviti, ke la nuntempa stato de la homoj enhavas tiom da danĝeraj faktoroj, ke la tuta homaro riskus ekstermiĝi, se tio dependus nur de la homoj mem. Ili estas tiom evoluintaj en tekniko kaj kemio, ke ili kapablas ekstermi praktike ĉion vivan sur la tero.

#### **2. La destino kaj celo por la homaro fare de pli alta potenco**

La potenco kaj volo de la homaro absolute ne estas la solaj, kiuj decidas pri la vivo sur la tero. La homaro ne kreis la terglobon aŭ ĝian vojjon en la spaco inter la steloj. Ĝi ne fiksas la rotaciojn de la terglobo kaj sekve ankaŭ ne ĝiajn jarojn, tagojn kaj noktojn, ĝiajn tempon kaj spacon. Ĝi ankaŭ ne fiksas la formon, klimaton, substancon kaj atmosferon de la terglobo. La homaro ankaŭ ne fiksas ĝiajn kontinentojn kaj marojn, ĝiajn specialajn formojn de planto-, besto- kaj mikrovivo. aŭ

Ĉu ne tiu granda kreoproceso estas ĝuste logika? – Ĉu en fina stato iuj el tiuj kreaĵoj en la naturo ne estas ĝojo kaj beno por vivaj estuloj? – Ja ĉu ne nia propra organismo estas konkreta nerefutebla pruvo pri tio, ke tiu kreoproceso estas cent procente logika? – Ĉu ne pro ĝi ni povas aŭdi, vidi, flari, gustumi, senti, pensi kaj krei? – Ĉu ne same validas por la bestoj? – Ĉu ne ankaŭ ili havas organismon, kiu ĝuste kiel eble plej altgrade estas konstruita kaj formita por plej eble utili en tiuj specialaj vivoformoj kaj naturo, en kiuj ĝia origino nuntempe troviĝas? – Kiam tiel ĉiuj finkreitaĵoj en la naturo vere estas ĝojo kaj beno por vivaj estuloj, tiam montriĝas fakto por la evoluinta esploristo, ke ĝuste tiu beno por vivaj estuloj estas la celo por ĉia kreado, ĉia estado kaj ĉia vivo.

#### **3. Akcidentoj kaj suferoj estas rezulto de la nefina stato de la homaro**

Ĉi tie sur la tero ja tamen troviĝas multege da okazaĵoj aŭ kreoprocesoj, kiuj ŝajne ne estas ĝojo kaj beno por vivaj estuloj, sed donas grandajn malfacilaĵojn kaj suferojn al ili, kaj eĉ estas saboto kontraŭ la vivo kaj aspektas kiel malbeno. La sola ebla kaŭzo de tio estas, ke ĝi estas rezulto de nefinaj statoj kaj okazaĵoj. Kiam la homoj mensogas, fraŭdas, ŝtelas, ĉikanas kaj ĝenas sian proksimulon, militas, torturas, kripligas, murdas kaj mortigas kaj mem estas malfeliĉaj, troviĝas en sufero kaj funebro, invalideco, malriĉo kaj mizero, tiam la kaŭzo estas, ke ilia menso aŭ spirita strukturo absolute ne estas finevoluinta. Tiu menso aŭ spirita strukturo ne atingis la finan stadion, kie ĝia origino povas nur cent procente esti ĝojo kaj beno por vivaj estuloj aŭ povas plenumi la agon “ami Dion super ĉiuj aferoj kaj sian proksimulon kiel sin mem” (Mat. 22.37), t.e. la samo kiel esti “laŭ la bildo de Dio simila al li” (Gen.1.26).

#### **4. Oni mem estas la plej profunda kaŭzo de sia propra sorto**

Esti laŭ “la bildo de Dio simila al li” (Gen.1.26), tio estas la celo por tiu longa evoluproceso, en kiu la homaro troviĝas. Kaj por la evoluinta esploristo tio montriĝas fakto pere de la multaj evoluŝtupoj, kiuj troviĝas en kronologia sinsekvo, kaj sur kiuj la homoj de la tero troviĝas. Ni vidas, ke laŭgrade tiuj evoluŝtupoj atingas de la primitiva naturhomo antaŭen al la kulturhomoj plej progresintaj en humaneco kaj intelekteco. Ni vidas, ke tre delikate kaj senrimarke tiuj evoluŝtupoj iras unu en alian. Por kompreni tion oni kompreneble lernu kompreni la principon de renaskiĝo aŭ reenkariniĝo, kiu kondiĉas, ke la evoluo okazas tra longa vico da fizikaj, teraj vivoj. Laŭ kompreno de la principo de reenkariniĝo oni atingas komprenon pri la sortoformado de la homoj, kaj oni komprenas, ke oni mem estas la plej profunda kaŭzo de sia propra sorto. Tiel oni venas al kompreno pri tio, ke al multe de sia nuntempa sorto oni mem estigis la kaŭzon en antaŭaj vivoj, kaj ke sekve oni estas mastro de sia propra sorto.

#### **5. Tri homtipoj kiuj karakterizas la nuntempan sorton de la tera homaro**

Kiam la vivaj estuloj devas trairi tiom da suferoj kaj vivmallumo kiel fakte okazas, do la celo estas pere de la sekvantaj spertoj ricevi saĝon kaj intelekton por krei la kaŭzojn de tiuj efikoj, kiuj estas ekskluzive sorto de feliĉo kaj ĝojo aŭ tiu totale vera kaj reala vivlumo, kiu faras la estulon “laŭ la bildo de Dio simila al li” (Gen.1.26).

En la sekva teksto kaj surbaze de la jam prezentitaj konsideroj ni observos tri homtipojn, kiuj laŭ sia speciala stato karakterizas la sorton de la homaro. Informado pri la kunefiko de tiuj tri specialaj homtipoj en la sorto de la homaro eble povas utili al multaj el tiuj homoj, kiuj serĉas la veron pri la vivo kaj la kaŭzon de tiu disvastigita atmosfero de milito kaj armado, kiu nuntempe sabotas grandan parton de la terhomaj feliĉo kaj ĝojo pro la ekzisto.

#### **6. Viva origino malantaŭ ĉiuj kreoprocesoj de la naturo**

Jam en la antaŭa teksto ni vidis, ke la granda kreoproceso, kiu ĉirkaŭas nin, estas cent procente logika. Tiu proceso, kiu ampleksas la transformon de la homoj al finaj estuloj, havas nur la celon esti ĝojo kaj beno por vivaj estuloj. Kiam ekzistas tia celo por la grandioza aŭ giganta kreoproceso de la naturo, tiam tio montras kiel fakton por la matura esploristo, ke troviĝas deziro aŭ volo por konduki tiun planon antaŭen al venko. Kaj la ekzisto de volo montras kiel fakton, ke tiu volo havas posedanton. Volo ne estas memstara realaĵo, kiu povas pendi libere en la aero aŭ esti rezulto de iu “nenio”. Ni vidas, ke ĝi konsistigas logikan planon, sed logika plano povas esti rezulto nur de pensado, kaj pensado povas ekzisti nur kiel esprimo de menso aŭ konscio. Tiu volo, kiu realiĝas en la kreoprocesoj de la naturo, do montras al la matura esploristo, ke ekzistas volo, pensado kaj sekve ankaŭ pensanta kaj konscia origino malantaŭ la kreoprocesoj de la naturo kaj per tio ankaŭ malantaŭ tiuj de la tuta homaro kaj malantaŭ ĝia sortostato realigata pere de tio.

#### **7. Naskiĝo de nova mondkulturo**

Tiu volo ja superas la kreoprocesojn de la homoj, kaj jam fariĝis fakto por ni, ke ĝia celo estas transformi la homojn de la tero en la bildon de Dio similan al li (Gen.1.26), en la plej altan formon de feliĉo kaj ĝojo pro ekzisto. Tial ni ne bezonas aŭskulti la multajn terhomajn eldirojn pri la ekstermo de la homaro, pri pereado de la terglobo aŭ pri savoprocesoj pere de “flugantaj teleroj” kaj homoj de aliaj planedoj. Oni ankaŭ ne bezonas timi pereon de la terglobo pere de ia ajn el la konstelacioj de planedaj vojoj tiel, kiel iuj astrologoj kaj mistikistoj nuntempe anoncas al la homoj. Estas ĝuste, ke nuntempe la planedoj troviĝas en tre malofta konstelacio, kaj ke pro sia elradiado de forto ili pli aŭ malpli influas unu la alian. Tiu influo havas absolute nur kunefikan influon sur la vivon de la tero, se neniu el la planedoj elvenas el sia normala vojo, kaj nuntempe ne videblas tia risko. La tero ja troviĝas en malluma krizo, sed tiu krizo ne estas nenormala stato. Estas ja enmetite en la kreoplanon de Dio, ke la homoj devas sperti la efikojn de siaj eraraj agoj. Sed tiu stato de mallumo estas ja ĝuste la naskodoloroj de nova mondepoko, kiu jam komencis sur multaj kampoj.

## **8. Tio kio okazos en la nova mondepoko**

En tiu nova epoko ĉiaj milito, malriĉo kaj mizero estos forigitaj iom post iom. La homaro fariĝos laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen.1.26). Ĉiuj ŝtatoj sur la tero unuiĝos en unu regno, kaj la homaro fariĝos unu greco kaj unu paŝtisto. Tiam la religieco de la homaro ne plu estos bazita sur instinkto aŭ nura kredo, sed sur scienco, faktoj kaj realo. Ĉiuj kuraĝas rekoni la vivon de Dio, kiu aperas ĉie kaj en ĉiuj.

## **9. Tiuj kiuj atingos la solvon de la sorto de la homaro**

Kiel oni povas scii, ke la menciita stadio vere estos la fina rezulto de la sorto de la homaro? – Ne estas tre malfacile atingi rekonon de tio, se ni esploras aŭ observas la homaron. Se ne pere de la religia instinkto ni ankoraŭ estas ligitaj al la transdonitaj religiaj dogmoj destinitaj ĝuste nur por la homoj de la kredo kaj ne de la scienco, kaj ni ankaŭ ne estas ligitaj al la materiismo, sed estas humane evoluintaj, do ni neeviteble trovas tiun solvon de la sorto de la homaro, kiu estas traktita en la antaŭa teksto.

## **10. La naturhomo aŭ besta homo**

Se ni observas la homaron, ni neeviteble ricevas konfirmon de la fakto, ke ĝiaj homoj troviĝas en skalo de evoluŝtupoj, kiuj etendiĝas ĝuste de primitivo kaj antaŭen al certa grado de intelekto. Kaj tion oni povas esprimi ankaŭ kiel evoluepokon de “naturhomo” al “kulturhomo”. La homaro de la tero konsistas el tre granda nombro da “naturhomoj”, t.e. homoj, kiuj vivis sian vivon ĉefe en la ĝangalo kaj tiom postrestas en la evoluo, ke nur ĉi tie en la dudeka jarcento ili estas enkondukataj en la modernan kulturon, kaj tial tiu kulturo nature estas nekutima kaj malfacila por tiuj homoj. Dum ĉiuj siaj antaŭaj vivoj ili vivis en vivoformo, kiu same kiel tiu de la bestoj estis preskaŭ ekskluzive bazita sur instinkto. Tiu instinkto diris al ili, ke ekzistas nevideblaj potenculoj. En sia fantazio ili konceptis ilin kiel spiritojn, diojn kaj diablojn. Tiuj imagoj fariĝis komune aŭtoritataj religiaj dogmoj, leĝoj aŭ gvidiloj por pluraj triboj. Tiuj homoj ankoraŭ multe konformas al la bestoj. Iliaj konscifunkcioj realiĝas ĉefe pere de la instinkto- kaj pezenergikapablo. Tie la pezenergikapablo estas interalie ilia milito- kaj mortigokapablo, ĉar ankoraŭ ilia sento ne donas vere humanan reagon. Tial ili vivas en milito, malamo kaj venĝo. Ilia inteligentokapablo estas tre malgranda, preskaŭ latent. Tial ili ne havas sciencon kaj sekve vivas en primitivaj subsentomondo kaj superstiĉo. Iliaj fizikaj rimedoj aŭ helpiloj en la ĉiutaga vivo estas tre simplaj kaj primitivaj. Tiu homtipo ankoraŭ aperas kiel “bestohomo”.

## **11. La kaŭzo de kruda sorto por la kulturhomoj**

Granda parto de la homoj de la tero apartenas ankoraŭ al la kategorio de bestaj homoj, kaj la ceteraj homoj sur la tero fariĝis dependaj de tiuj naturhomoj, ĉar iliaj vivoj kunligiĝis. Pro siaj superaj inteligento kaj militiloj la kulturhomoj humiligis tiujn homojn, konkeris iliajn landojn kaj riĉigis sin subpremante ilin. Tial evidentiĝas ĉi tie, ke tiu devio de la proksimula amo al tiuj plej malfortaj estuloj de la homaro fariĝas dum longa tempo neevitebla kaŭzo de kruda sorto por la subpremantaj homoj mem. Tiel per sia speciala mensostato kaj vivkoncepto la kulturhomoj mem kreis la kaŭzon de venonta malagranda sorto.

## **12. La mensostato de la ordinara kulturhomo**

Kiu diferenco troviĝas inter la tiel nomata moderna militsintena “kulturhomo” kaj la “natur”- aŭ “bestohomo”? – Tio, kio levis la “kulturhomon” supren de la “bestohoma mensostato”, estas absolute nur ĝia pli progresinta evoluo de inteligento. Ĉi tie ni atentigu, ke sub la nocio “kulturhomo” troviĝas du specoj de homtipoj. La diferenco inter ili estas, ke la unu estas evolue pli progresinta ol la alia. Unue ni rigardas tiun tipon de homoj, kiu estas plej disvastigita, kaj kiu estas la reganta potenco en la homaro. Tiu ĝenerale valida mensostato de la moderna tipo de kulturhomo funkcias altgrade pere de degeneranta instinkto kaj intelektigita pezenergio, kaj en sia plej malbona apero ĝi estas preskaŭ sen humana sento. La degeneranta instinkto, kiu efektive realigis ilian

religiecon, kies lasta paŝo estis stimulata en humana direkto al la kristana kaj la aliaj humanaj mondreligioj, tiu instinkto iom post iom perdis influon.

### **13. La kaŭzo ke homoj fariĝis materiistoj kaj sendiaj**

En precipa grado tiu kaŭzo estas sur tiu evoluŝtupo la forte kreskanta inteligento. La gvidaj religiaj dogmoj ne estis destinitaj por homoj kun fortaj inteligentoevoluo kaj exploremo. Tie tiuj dogmoj estis tre nekontentigaj. Ili estis eĉ ne akcepteblaj. Pro tio la homo perdis la kapablon kredi je io, kio ne estis provebla por la inteligento kiel realisma fakto. Ne eblas pruvi la religiajn absolutajn rezultojn sole nur por la inteligento. Necesas evoluo de unu plia senskapablo, kiu ankoraŭ troviĝas malproksime for de la evoluŝtupoj de tiuj homoj, kaj tial ili fariĝis materiistoj.

### **14. La homoj atingis gigantan potencon super la fortoj de la naturo**

Multaj el la materiistoj perdis komplete la kapablon kredi je iu klarigo pri la plej altaj spiritaĵoj rezultoj de la vivo. Ili fariĝis sendiaj, sed veraj gigantoj en inteligentecaj povo kaj scio. Ĉi tie mi ne bezonas trakti tiun grandegan amason da praktikaj teknikaj kaj kemiaj bonaĵoj, kiujn la inteligentohomo aŭ scienco donis al la homoj. Per tio ili atingis regadon super fortoj, kiuj estas milionoble kaj milionoble pli fortaj ol necesas. Sen tiu giganta surpluso da fortoj la mondo bone povas fariĝi perfekta terglobo, sur kiu povas okazi nek milito nek malpaco, mondo en kiu ĉiuj amas ĉiujn anstataŭ kiel nun, ĉiuj militas kontraŭ ĉiuj. Kion la homo devas fari per tiu gigantamaso da fortoj, kompare kun kiu ĝi mem estas preskaŭ nur liliputa estulo? – Tio estas kiel la imago, ke muŝo ricevis kapablon eksplodigi domon. Kiel la liliputa homo nun traktas tiun gigantan forton, super kiu ĝi fariĝis mastro? – Kiel homo uzas sian potencon dependas de tio, kiel ĝia menso aŭ konscio estas kombinita. En la nuntempe reganta mondpolitiko ni povas vidi, ke ĝin realigas homoj, kies konscio estas kombinita ĉefe per instinkto-, pezo- kaj inteligentenergioj, sed ankaŭ kun sento, kiu ne havas specialan humanan energion. Tio ne malebligas, ke en la mondpolitiko troviĝas homoj kun humana sento, sed ili ne havas la potencon. Ili ne estas la gvidantoj. Plej altgrade ili povas nur partopreni mildigon de la kruda, egoisma, nacia militpolitiko, kiun praktikas la instinkto-, pezo- kaj inteligentohomo kaj en plej malbona kazo centprocente je la kosto de aliaj popoloj kaj ŝtatoj.

### **15. Diablokonscio**

Efektive la mondo spertis la plej frapajn ekzemplojn de la diktatora regoformo de la malhumana instinkto-, pezo- kaj komenciĝanta inteligentohomo. Ĉu ni ne vidis tian regoformon subpremi komplete ĉiajn moralon, religion, liberon kaj memstaran pensadon? – Ĉu ni ne vidis ĝin torturi kaj turmenti homojn ĝismorte en koncentrejoj aŭ mortigejoj? – Ja ĉu ni ne vidis ĝin intence ekstermi eĉ tutan popolon for de la tero. Kaj ĉu ne en alia kazo ni vidis ĝuste, kiel la instinkto kaj la intelektigita pezenergio kaj malhumana sento kreis totalan teruron, morton kaj pereon de la loĝantoj de du grandaj milionurboj? – Ĉiuj viroj, virinoj, infanoj, familianoj, amikoj kaj konatoj ekstermiĝis aŭ transvivis kun la plej teruraj suferoj, la plej korŝiraj invalidecoj, kaj kun nesaniĝeblaj vundoj konservataj de konstante skrapanta aŭ brulanta radioaktivado en iliaj organismoj.

La kaŭzo de la milito kaj la sekvantaj suferoj kaj mallumo estis do homtipo kun speciala kombino de la mensaj energioj en la psiko. Kiel jam menciite, ĝia religia instinkto estas degenerinta, kaj tio signifas, ke ĝi ne plu kapablas kredi je la religiaj gvidaj preskriboj pri la proksimula amo. Post tio la pezenergio, la energio de malamo kaj kolero, estas la pli aŭ malpli gvida en la menso. Ĉar la homoj de tiu tipo havas ankoraŭ nur primitivan senton, ili estas samgrade malhumanaj. Ili estas tre egoismaj kaj facile ofendiĝas. Ili preskaŭ ne povas pardoni pro ofendo, sed pli aŭ malpli havas la sintenon reciproki aŭ venĝi ĝin. Ĉar ilia inteligento estas pli aŭ malpli progresinta en evoluo, ili fariĝis kapablaj intelektigi sian agmanieron favore al sia egoisma kontentigo. Ĝuste tiu tipo de homoj kondukis la landojn en militon, subpremis aliajn popolojn kaj ekspluatis iliajn naturvaloraĵojn. Tiu tipo en pura formo ne havas iajn ajn skrupulojn. Ĝi ne havas konsciencon, kaj ne pli altan senton de moralo, same kiel ĝi ankaŭ ne havas sentojn de humaneco. Ĝi sekve kapablas uzi la plej teruran torturon kaj la senskrupulajn metodojn por kontentigi sian malhumanan avidon, senkonsidere kiom da funebro, sufero, morto kaj pereado tio kaŭzas al aliaj

homoj. Tia homtipo absolute ne estas vera kulturhomo. Tio, kio en precipa grado levas ĝin super la naturhomon, estas do ĝia komenciĝanta inteligentokapablo. Ĉar ĝi estas malhumana kaj sendia, ĝi povas uzi sian inteligenton nur helpe al realigo de sia malamo aŭ kolerenergio kaj helpe al kontentigo de siaj egoismaj kaj malamikaj avidoj. Tial ĝi ovacias ĉiajn militismon kaj militadon, armadon kaj kreadon de la plej teruraj nukleaj armiloj aŭ atomaj kaj hidrogenaj bomboj. Homo kun tiu mensa strukturo estas, kiel antaŭe menciite, ne iu vera kulturhomo. Ĝi ankaŭ ne estas naturhomo. Por tio tiu estulo estas tro supera en materiaj scio kaj povo. Ĉar ĝi ovacias la principon de potenco, torturo, subpremo kaj ekstermo kontraŭ siaj malamikoj, do ĝi estas totale kontraŭa al la plej noblaj instruentoj aŭ preskriboj, kies celo estas ami Dion super ĉiuj aferoj kaj sian proksimulon kiel sin mem. Homtipo, kiu tiel kontraŭas al la plej nobla konduto, la vivmaniero laŭ la bildo de Dio (Gen.1.26), estas esprimebla nur kiel “diablohomo”.

## **16. Pachomoj aŭ komenciĝantaj kristohomoj**

Ne estas malfacile vidi, ke neniam ajn la bestohomtipo povos krei pacon en la mondo. Necesas absolute tute alia homtipo. Sed tiu homtipo komencis aperi jam antaŭ longe. Ĝi ne estas tiel multnombra kiel la diablotipo, kiu ja ekzistas en tre granda kaj supera plimulto. Sen tiu nova homtipo la diablo- aŭ militohomo kreus kataklismon aŭ juĝotagan epokon, kiu estus ankoraŭ pli terura ol tiu, en kiu la homoj troviĝas nuntempe. Do troviĝas tri homtipoj en la tera homaro. Ne estas akraj limoj inter ili. La diablohomo ja evoluis de la naturhoma stadio, kaj multaj troviĝas ankoraŭ evolue en meza formo inter naturhomo kaj diablohomo. Estas ankaŭ multaj, kiuj antaŭ longe en antaŭaj vivoj trapasis la kulminstacion de diablokonscio sen tio, ke ili tute finis tiun konscistaton. Ili estas do meza formo inter diablokonscio kaj la fina “homo laŭ la bildo de Dio”(Gen.1.26), kiun ni nomu la “dihomo”. – Kiam troviĝas homoj, kiuj estas meza formo inter diablokonscio kaj dikonscio, do la kaŭzo estas, ke en sia konscio ili evoluigis humanan kapablon post tio, ke ili spertis la efikojn de granda parto de tiuj suferoj, kiujn ili kaŭzis al aliaj estuloj. Samgrade kiel la estuloj traspertas travivaĵojn de suferoj la humana kapablo evoluas. Tio signifas, ke laŭ evoluo de tiu kapablo la estuloj povas malpli kaj malpli elteni suferigi aliajn estulojn. Ĝuste tiuj homoj, en kiuj tiu humana kapablo komencis influi la konduton, estas pacbatalantoj, kontraŭas militon kaj armadon, kontraŭas torturon, kripligon, mortigon kaj murdon, kontraŭas mortpunon kaj kompreneble ĉian uzon de nukleaj armiloj, kiu estas veraj sabotado kaj ekstermado. Tiuj agoj ja kontraŭas la propran grandan kreoverkon de Dio mem aŭ la naturo. Funkciigo de ĉiaj prizorgo kaj helpo al homoj en mizero ja devenas de la humana pensklimate de tiuj homoj. Ankaŭ ĉiuj pacmovadoj kaj pacorganizoj, Unuiĝintaj Nacioj kaj la agado por malarmado venas de la estiĝanta vera homtipo. Tio kio diferencigas tiun homtipon de la tipo de milito- aŭ diablohomo estas la ŝanĝita kombino de ĝia mensa strukturo. Ĝi havas kompreneble ankaŭ iom da instinkto, kaj ankaŭ iom da pezenergio, sed laŭ la kapacito de la humana kapablo de tiu estulo ĝia pezenergio estas retenata aŭ antaŭ longe estas tute malfunkciigita tiel, ke kolero, malamo aŭ amaro kontraŭ aliaj estuloj ne okazas. Tiaj evolue progresintaj homoj kompreneble troviĝas en scienco, politiko, eklezioj kaj en la mondo de komerco kaj laboro. Iom post iom tiu humana homtipo regos la mondon tute laŭ tio, ke tra la militoj kaj suferoj la homoj de la diablotipo fariĝas humanaj aŭ pacaj homoj, kiuj estas kontraŭmilitaj homoj kaj komenciĝantaj kristohomoj.

## **17. Toleremo kaj protektado, sed ne per kolero, malamo aŭ amaro**

Ĉiuj homoj trairas la menciitan transformon. Sed ĉar la militohomoj ankoraŭ estas la granda plimulto kaj vivas en tiu preskaŭ nesuebla superstiĉo, ke la milito estas necesa, do estas tiu superstiĉo, kiu tenas la militosorton de la homaro en funkcio. Sed ili ne estas riproĉindaj pro tio. Ili ne estas riproĉindaj pro tio, ke provizore kaj pro mankanta humana kapablo ili ne kapablas pensi kaj agi alimaniere ol ĝuste per la kombino de siaj mensaj energioj en tiu konscio aŭ psiko sur tiu evoluŝtupo, kie ili troviĝas. Laŭ tiuj kapabloj kaj dispozicioj, kiujn ili ankoraŭ ne evoluigis, ili kompreneble ne povas agi. Tio do necesigas toleremon, sed tio nature ne signifas, ke oni ne rajtas protekti sin kontraŭ la bestaj aŭ diablaj manifestaĵoj aŭ konduto de tiuj homoj. Sed tiu protektado

kompreneble ne devas okazi en kolero per milito, malamo kaj ekscitiĝo kiel okazas ĝuste per la menso de la milito- aŭ diablohomo.

### **18. Per potenco oni ne povas ŝanĝi la menson de la homoj**

La sorto de la tera homaro estas ja destinita de la speciala konduto de la tri homtipoj de la tera homaro. Tie estas do la konduto de la natur- aŭ bestohomo, tiu de la milito- aŭ diablohomo kaj tiu de la komenciĝanta dihomomo. La sorto de la tera homaro estas do miksaĵo de la kunfandita konduto de tiuj tri homtipoj. Sed la plej forta konduto de tiuj tri homgrupoj estas tiu de la milito- aŭ diablohomo, kaj tiel longe kiel estas tiel, la sangelverŝo de la milito kaj la sabotado kontraŭ la vivo de la homaro daŭre vivtenas tiun superstiĉon, ke tiu konduto de la diablohomo estas la vojo aŭ la ĝusta ilo por forigi militon aŭ la malluman epokon de diablo aŭ juĝotago. Tiu diablo- aŭ mallumepoko de la homaro estas do tute natura stato sur tiuj evoluŝtupoj, kie la bestohomo transformiĝas al dihomomo. Oni komprenas, ke neniel eblas transformi la bestohomon al dihomomo nek per atomaj aŭ hidrogenaj bomboj nek per venĝo aŭ malamo. Por la homoj estas same maleble ŝanĝi per potenco tiun sorton de la homaro, kiel maleblas ŝanĝi la vojon de la suno en la spaco. En formo de la naturo Dio mem kondukas tiun grandan kreoproceson. Tiu proceso transformas la bestohomon al la diablo- aŭ militohomo, por ke per tio tiu homo povas evoluigi la humanan kapablon, kaj pere de tiu kapablo la estulo estas kondukata el la diabla mensostato antaŭen al la mensostato de la dihomomo.

### **19. La dihomomo kaj la savo de la mondo**

Nur la dihomomo povas savi la mondon. Ĉu ne ĝuste tiun menson Kristo rivelis sur la tero? – Ĉu ne meze en siaj suferoj sur la kruco li pardonis siajn malamikojn, siajn ekzekutistojn pro tiu ilia diablokonscio, pro kiu ili faris al li la plej terurajn procesojn de sufero kaj ekzekuto, kiuj ekzistas? – Ĉu li ne ĝuste instruis al siaj disĉiploj, ke oni devas pardoni sian proksimulon ne nur ĝis sep fojoj, sed ĝis sepdekoble sep fojoj ĉiutage? (Mat.18.22) – Ĉu li ne diris ankaŭ: “Ĉion ajn, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili”? (Mat.7.12) – La vojo al paco sekve estas la ago pardoni siajn malamikojn, kaj ĉu ne ĝuste nia misio estas klarigi tion en intelektigita formo? – Ja ne sufiĉas ami kaj pardoni siajn amikojn. Pardonado kaj amo al tiuj, kiuj ne ŝatas nin, estas la vojo al paco. Tiu homo, kiu povas fari tion tutkore, baldaŭ komencos ekvidi, ke ĝi havas en si mem tiun pacon, pri kiu la tuta mondo avidas kaj sopiras. Pere de sia komenciĝanta intuicio tiu homo spertos tiun dian pacon kiel la spiriton kaj forton de Dio, kaj ĝi spertos, kiel tra ĝi mem tiuj spirito kaj forto de Dio realigas la mondpacon pli kaj pli por la pacavidaj estuloj, kiujn Dio prezentas sur ĝia vojo. Tiel la mondpacon estiĝos en la psiko de ĉiu homo, kiu povas tutkore pardoni sian proksimulon. Absolute ne troviĝas alia vojo. Ĉiufoje, kiam vi pardonas vian proksimulon, vi kunagas en la savado de la mondo. Vi kunagas en la mondliberigado de la dudeka jarcento, kiu estas la kreado de la “bildo de Dio” sur la tero.

*Originala dana titolo: Tre menneskertyper i skabelsen af “Guds billede” på jorden. M2368  
El prelego la 05.02.1962 en Martinus-Instituto. Traduko Ib Schleicher 1999. Unua publikigo en  
dana Kosmos n-ro 1, 1997.*

## La monda ŝtato

### de Ole Therkelsen, parto 2 el 2

#### 11. La falsa negoca principo

Kadre de kapitalismo kaj liberalismo oni favoras lasi merkatajn fortojn nebriditaj, kio implicas ke kadre de la leĝo la plifortulo havas la rajton ekonomie ekspluati la malplifortulon. Se varo malabundas, ĝia prezo plialtiĝas, sen tio ke la varo samgrade pliboniĝas. Oni pretas pagi pli multe ĉar oni estas en bezono, pro tio ke la varo malofitas. Martinus skribas: “Riĉigi sin mem danke al la bezono kaj nehavo de aliaj homoj parencas al ĉantaĝo”. (LEM2 par. 26.9).

Invokante liberecon, oni en la liberalismo same kiel en la ĝangalo favoras la rajton de la plifortulo subigi kaj ekspluati la malplifortulon. Sed la tasko de la leĝdonado estas ĝuste la malo, nome protekti la malfortulon aŭ tiun kiu ne povas mem protekti sin. Oni ne povas postuli liberecon pri ĉio, oni ne povas havi liberecon ŝteli kaj mortigi, tio estas leĝe malpermesita. La gajno aŭ superprezo de la komerca mondo reale estas, laŭ Martinus, kamuflita principo de rabado. (LEM2 par. 26.12).

Nun oni kompreneble objektos ke oni aĉetante kaj vendante bezonas havi gajnon, ĉar kiamaniere alie vivus la komercistoj. – Jes, tio estas tute vera, ĉar la sistemo havas tutmondan formaton kaj neniel povas ŝanĝi ĝin unuopa homo aŭ iu registaro aŭ politiko. La ŝanĝo de la sistemo estas sole nur demando de evoluo kaj povos okazi nur je tutmonda nivelo. La venontaj ekonomiaj krizoj kaj kolapsoj, jen je nacia, jen je tutmonda nivelo, klare montros al la homoj ke la nuna sistemo estas malĝusta. En la momento de verkado en 2009 estas granda internacia banka krizo, kie oni denove vidas ke la solvo ne estas la malbrido de la merkataj fortoj, la proponado kaj postulado, sed male laŭplana intervenado fare de la ŝtato.

Sed la granda plimulto de la teraj homoj plu fervoregas pri la nuna sistemo de privata propio, la negoca principo kaj la nebriditaj merkataj fortoj.

Martinus skribas: “Sed pro sia neperfekteco aŭ nefinita stato la sistemo tamen estas malobservo de *la kosma monda moralo* same kiel ĉiuj ceteraj malobservoj de la kosmaj leĝoj, en kiuj vivas la homoj. Tial la homoj ricevos la karman suferon aŭ ragnarokon rezultantan el tio. Tiuj sperto, scio kaj evoluigo de la amo al la proksimumo, kiujn tio estigos en la konscio de la homaro, estas la absolute solan faktoro, kiu povos ŝanĝi la sistemon. Kaj lige kun la spirita scienco tiu ŝanĝo okazos kaj ekonomie solviĝos en kulmina justeco kiel finrezulto.” (LEM2 par. 26.12).

La vera negoca principo konsistas en la interŝanĝado de varoj laŭ la principo “egalvaloro kontraŭ egalvaloro”, dum la falsa negoca principo estas bazita sur alproprigo de laŭeble granda valoro kontraŭ laŭeble malgranda rekompenco.

La vera negoca principo kulminas en tiu “pli feliĉe doni ol preni”, kiu estas la perfekta kondutmaniero kaj forigos ĉiujn kontraŭsociajn akumuligojn de materiaj valoroj en la formoj de kapitalo kaj privata propio, favore al la kreo de totala socia ekonomia ekvilibro tutmonda, tiel same inter la unuopaj nacioj kiel inter la unuopaj homoj. Tiamaniere en la monda ŝtato estos nek riĉuloj nek malriĉuloj. (Vidu LB4 par. 1333).

Martinus skribas: “Nek “malriĉuloj”, nek “riĉuloj”, sed ĉioprogresiga bonstato el ĝojo, feliĉo kaj beno al ĉiuj teraj homoj sur la tuta tergloba estos dominanta faktoro.” (LB4 par. 1333).

#### 12. La problemo de senlaboreco

Hodiaŭ estas kvazaŭ superfluo da homoj, ĉar estas ĉiam kreskanta grupo da senlaboruloj por kiuj ne ekzistas dungo. Ni frontas ŝajne nesolveblan problemon. Tre bone estas ke ekzistas sindikatoj, senlaborecaj fondusoj kaj subvenciaj aranĝoj, sed ĉio tio estas nur provizoraj solvoj, ili ne povas fundamente solvi la problemon de senlaboreco.


La senlaboreco fariĝis tutmonda problemo, kiun neniu nacio nek iu ajn politika partio de la mondo povas solvi. La senlaboreco, kiu en pli vasta perspektivo estas nedaŭra, estas sekvo el la natura evoluo kaj kulturkreo de la tera homo. Sed lige al la kreo de nova monda moralo kaj de nova



monda kulturo montriĝos la neceso harmoniigi la politikan vivon al la plua evoluo de la homo.

Martinus skribas: “Kaj dum la terhoma politiko aŭ la terhomaj regadformoj ne estas harmoniigitaj kun tiu kursoŝanĝo farita de la naturo mem, la senlaboreco kreskos kaj kreskos ĝis ĝi estos tiu potencfaktoro per kiu la naturo faligos la nunan sintenon de la tera homo pri individua proprieto kaj civitaneco.” (La homa laborkapablo, Kosmos n-ro 8/2006).

Oni argumentis ke maŝinoj kaj nova teknologio kulpas pri pliiĝo de la senlaboreco. Maŝinoj, komputiloj kaj robotoj ĉiam pli multe transprenas el la homa laboro. Sed sen kursoŝanĝo nur ĉiam pli malgranda grupo da homoj havos aliron al laboro, nome tiuj kiuj posedos la maŝinojn, kaj tiuj kiuj manipulos ilin. Ili fine ekhavigos la potencon en la socio, se la evoluo ne havos pli altan celon.



© Martinus Idealfond 1964

Reg. 26

### 13. La ĝusta monda administrado

Kio do estas ŝanĝenda en la nuna socia sistemo? – La socia sistemo devus ŝirmi ĉiujn valorojn kaj resursojn favore al la komuna intereso kaj ne favore al la privata intereso. La privata intereso havas egoisman aŭ bestan naturon, kiu tre bone funkcias en la besta regno kaj en la pli primitivaj partoj de la homa socio, sed ĝi ne povas fundamenti kreon de daŭra paco surtera.

La komuna intereso devas antaŭi la privatan intereson, kaj ni ja ankaŭ vidas ke la socia evoluo jam iras tiudirekte en la modernaj socialaj ŝtatoj. Pere de heredaj kaj aliaj impostoj la privata kapitalo grade transiros al la ĝenerala publiko aŭ al la ŝtato.

Ne eblas solvi la problemon de senlaboreco pro la nunaj kapitalrilatoj, en socio kiu havas miksan ekonomion bazitan sur ambaŭ el la privata kaj ŝtata kapitaloj. La problemon oni povas solvi nur per justa administrado de ĉiuj mondaj valoroj.

Martinus skribas: “La evoluo neeviteble kondukos al la kreo de internacia monda ŝtato, en kiu aŭtoritato enoficigita de la plimulto kontrolados ke neniu homo povu vivi je la kosto de aliaj, kaj ke al neniu homo mankos la laboro necesa por vere feliĉa vivo. Ĉar la monda socio tiutempe posedos ĉiujn valorojn, la koncepto “mono” ne plu ekzistos. La sola valoro en ĉi tiu socio estos la homa laborkapablo. (La homa laborkapablo, Kosmos n-ro 8/2006).

Ĉar estos nur unusola labordonanto sur la terglobo, nome la monda ŝtato, eblos redukti kaj dividi la laboron egale al ĉiuj homoj, tiel ke neniu estos senlabora. Ĉiu homo rajtas laboron por gajni la ĉiutagan panon kaj loĝlokon. Estas kvazaŭ krimo fare de la socio ne prizorgi ke ĉiuj povas havi la naturan laboron necesan por la konservado de la vivo.

### 14. Abolo de la monsisistemo kaj de la privata proprieto

La negoca principo kun sia troa prezo estas la kaŭzo de la grandaj akumuliĝoj de privataj valoroj

kaj kapitalo. La negoca principo en sia origina kaj perfekta strukturo funkcias per var-interŝanĝo en kiu oni donas egalvaloron kontraŭ egalvaloro. En tiun rilaton mono estis enkondukita kiel praktika interŝanĝilo. Ekzemple povus esti tre malpraktike se oni enirus vendejon volante interŝanĝi suĉporkidon por nova vestokompleto.

Mono ne konsistigas valoron en si mem, la homaj krea kaj labora kapabloj estas ĝia sola efektiva valoro. Sed la nuna ekonomia sistemo de kapitalismo, liberalismo, nebriditaj merkataj fortoj ktp. malebligas al homoj akiri enspezojn sen laboro.

Se iu aĉetas tablon de valoro respondanta al 10 laborhoroj kaj tuj pluventas ĝin kontraŭ valoro respondanta al 20 laborhoroj, li ekhavis la valoron de 10 homaj laborhoroj, mem kontribuante neniom da laboro. Jen oni facile kalkulas ke ie en la sistemo devas esti homo kiu laboris dum 20 horoj, sed estas malsufiĉe salajrita kaj ricevas pagon nur por 10 laborhoroj. Kiam unu persono ie en la sistemo senlabore akiras enspezon, aliloke en la sistemo iu alia persono seniĝas pri responde valoro. De ie ja devas veni la mono. Tiamaniere oni kadre de la leĝo povas ŝteli la valoron de la laboro de aliaj homoj. Borsaj kaj valutaj spekuladoj, uzuro kaj negocoj kun troa prezo estas ekzemploj de tio. Plej profunde, senlabore akiritaj enspezoj estas ŝteloj de laborplenumoj de aliaj homoj.

Homo dum sia tuta vivo en la labormerkato povas plenumi difinitan nombron da laborhoroj, kiujn ni povus nomi “tutviva laborsumo”. Sed danke al la negoca principo, homo dum sia vivo povas krei al si riĉaĵojn kiuj respondas al la tutviva laborsumo de 10, 100 aŭ 1000 homoj. Ĉu tio povas esti justa? – Kiamanere unu homoj dum sia vivo povus plenumi same multe da laboro kiel 1000 homoj?

En Eŭropo oni strebas enkonduki komunan valuton aŭ monunuon, € – la eŭron. Tiajn strebojn oni vidos ankaŭ pli malfrue en la estonteco je tutmonda skalo. Je iu okazo oni sendube ĉi tie sur la tero ankaŭ havos unu komunan valuton aŭ monunuon.

Sed Martinus skizas ke la monsisistemo pli malfrue en la estonteco estos abolita, kaj ke la sola valuto aŭ monunuoj tiam ekzistantaj estos *la homa laborhoroj*. Ĉiu homo tiutempe havos universalan kontokarton aŭ vivpasporton, kie estos registrite kiom da horoj oni laboris. La sola pagilo kiun oni havos, estos la persone plenumitaj laborhoroj. Oni tiamaniere ne povos alproprigi al si la valoron de la laborhoroj de aliaj homoj. Pli detala ekspliko de tiuj rilatoj estas trovebla en LB1, ĉap. 4.

La privata propio estos abolita favore al komuna propio. La monda ŝtato posedos la sumon de ĉiuj resursoj, teritorioj kaj naturaj riĉaĵoj de la tero kaj certigos justan dividon.

La tuta ekonomia sistemo de la tero estos kalkulata de grandegaj komputiloj kiel komuna mastruma kalkulaĵo por ĉiuj homoj de la tero. Vivnivelo, kiu situos longe super la hodiaŭa vivnivelo, estos politike fiksita. Oni ekzemple povus decidi ke ĉiu homo posedu telefonon, komputilon, aŭton ktp., pro kio tiuj objektoj estos produktataj en la fabrikoj de la monda ŝtato kaj de tie iros rekte al la konsumantoj sen plikostigaj interŝtupoj kun komercistoj kaj importantoj.

## **15. La laborkondiĉoj en la monda ŝtato**

En la estonta ŝtato oni ne vidos ke milionoj da homoj mortas pro malsato kaj malriĉeco dum aliaj vivas en superfluo kaj trokonsumo. Tute simple estos neniu ebleco krei klasajn diferencojn aŭ ekonomiajn rangodiferencojn, neniu povos ekspluati aliajn. Ĉiuj estos bonhavaj, kaj oni povos ĝui la bonojn de la vivo sen ke aliaj devos vivi en malriĉeco kaj humiliĝo.

Infano kiu venas en la mondon, ne estos ekonomia ŝarĝo al siaj gepatroj, ĉar la monda ŝtato pagos ĉiujn kostojn. En la lernejo la infanoj ne nepre ricevos la saman instruadon, nur ĉar ili havas la saman aĝon. Ĉiu infano estos instruata laŭ siaj inklinoj, intereso kaj talentoj, por ke ĝi ĝuste en tiu kampo fariĝu lerta kaj laŭeble utila al la socio.

La monda registaro same multe interesiĝos pri la kapabloj kaj inteligento de ĉiu homo kiel multaj registaroj hodiaŭ interesiĝas pri impostoj kaj aliaj ekonomiaj demandoj. Se oni estas muziktalenta, oni ricevos edukon en muziko. Se oni havas siajn kapablojn kaj intereson en biologio aŭ tekniko, oni havos sian edukon en tiuj kampoj. Tiamaniere ĉiu kontribuos sian parton por la konservado de la monda ŝtato en tiuj kampoj, kie oni havas siajn talentojn kaj inklinojn.

## **16. Vivpasporto kaj laborkvitancoj**

La sola vera valoro kiun havas la homoj, estas la homa laborkapablo, ĉar ĝi estas la sola kiu povas transformi la materialojn en vivproduktojn en la ĉiutaga ekzisto. (Estonta monda kulturo, Kosmos n-ro 5/2006).

Por konservi la deciditan vivnivelon de la monda socio, ĉiuj homoj devos fari devigan laboron, kiu tamen daŭros nur kelkajn horojn semajne. La monda ŝtato povos science per grandaj komputiloj precize elkalkuli, kiom da laborhoroj kostos la vivkonservo de ĉiu homo. Farinte kvanton da laboro, oni ricevos laborkvitancon kiu estos la sola pagilo de la individuo, kaj ĝi permesos utiligi la ŝtatajn transportilojn, aviadilojn aŭ fervojojn kaj viziti la ŝtatajn teatrojn, kinejojn, muzeojn, ekspoziciojn, trafikilojn kaj nutraĵojn laŭ amplekso kiu respondos al precize tiom da laborvaloro kiom estas indikita en la kvitanco. (Eventuale vidu LB1 par. 112).

Neniu gajnas monon, ĉiuj pagas per laboro. Se oni deziras disponi pri pli multaj el la bonoj krom la ordinaraĵoj, oni devas pagi per respondaj ekstraj laborhoroj.

Proksimume kiel oni hodiaŭ havas kreditkarton, oni do estonte havos vivpasporton aŭ vivkonton, en kiu ĉiuj oniaj laborhoroj estos registritaj, kaj persone plenumitaj laborhoroj estos la sola ekzistanta pagilo kiun oni disponos. Se oni ekzemple deziras ekstran aŭton, tio estas havebla. Tiam estos farita kalkulo pri la nombro da laborhoroj necesaj por fari aŭton, kaj tiam oni devos labori respondan nombron da horoj en sia propra laborkampo.

Malgranda procento el oniaj propraj laborhoroj iros al fonduso por infanoj, malsanoj kaj aĝiĝo, tiel ke ĉiu pagos por si mem, kaj neniu estos ŝarĝo al aliaj.

Se oni havos infanojn, oni povos elekti mem prizorgi ilin kaj ricevi laborkvitancojn pro tio, aŭ prizorgigi ilin per aliaj, dum oni mem laboras alikampe ricevante laborkvitancojn pro tio.

Malaperos la heredaj, spekulaj kaj loteriaj gajnoj kaj la similaj senlabore akirataj enspezoj, kaj estos nenia patentado aŭ posedo de kopirajto. Ĉiu inventinto, sciencisto kaj artisto ricevos laborkvitancojn por sia laboro same kiel ĉiuj aliaj, kaj oni faros sian laboron profite kaj plezure al ĉiuj homoj. Per la interreto estos libera aliro al ĉiaj televido, muzikaĵoj, informoj kaj klerigiloj de la tuta mondo.

## **17. Multaj profesioj malaperos**

Ne estos konkurantaj firmaoj ofertantaj aliron al telefono, televidaj kanaloj kaj interreto. Ĉio tio estos senpage disponigita al ĉiuj loĝantoj de la planedo. Estos neniu reklamado kaj neniu komercistaro, male estos afereca informado al la konsumantoj. Kiam difinita vivnivelo estos politike fiksita, tiam aŭtoj, televidiloj, komputiloj ktp estos liverataj rekte de la produktejo al la konsumanto sen plikostigaj interŝtupoj. La varoj plikostiĝas, sed ne pliboniĝas, pasante tra la interŝtupoj de la komercista medio.

Ne troviĝos poŝtaj, bankaj kaj asekuraj kompanioj konkurantaj pri la klientoj, ekzistos nur unu banko kaj unu asekuro en la formo de la vivpasporto, kiun oni ricevis de la ŝtato. Malaperos multegaj neproduktivaj laboroj ligitaj al ĉiuj specoj de biletkontrolo, dogano kaj imposto.

La armeojn kaj militŝiparojn de ĉiuj landoj oni anstataŭigos per internacia nepartia monda polico, kiun kontrolados nepartia monda kortumo. (Vidu LB1 par. 102). La internacia kortumo en Hago kaj la UN-soldatoj estu rigardataj kiel embriaj stadioj de tiu evoluo.

Longa vico da neproduktivaj profesioj, pri kontrolado, komercado, reklamado, militado, malaperos favore al ĝenerala malpliigo de la labortempo. Se ekzemple aperos mirinda teknika invento kiu povos redukti la laboron al la homoj, tio ne kiel hodiaŭ rezultigos senlaborecon, sed malpliigon de la labortempo al ĉiuj homoj sur la tero, ekzemple de kvin minutoj semajne. Ĉiu invento sen patento tiamaniere utilis al la tuta homaro, kaj oni vidos ke “la maŝinoj estas niaj amikoj”. Tio respondas al la Biblia promeso aŭ profetaĵo ke la homo subigos al si la teron. La homoj laborigis por si la elementojn. Per nura butonpuŝo homo povas startigi centralon, kapablan produkti milionojn kaj milionojn da ĉevalfortoj.

## **18. Libertempo kaj studotagoj**

En la monda ŝtato la homoj havos ĉiam pli da libertagoj, sed tiujn oni ne pasigados nur en

neniofarado. La anticipajn simptomojn de ĉio tio ni hodiaŭ vidas en la formo de vesperlernejoj kaj popolaj universitatoj. Ĉar mankos materia aŭ fizika laboro, la laboro havos pli spiritan naturon. La monda ŝtato senpage disponigos instruistojn kaj instruadon, tiel ke oni povos studi filozofion, historion, arton, sciencon, lingvojn, ekonomikon, metiojn, ĉion laŭ tio kie oni havas siajn specialajn emojn, interesojn kaj lertojn. Oni ankaŭ povos studi spiritan sciencon kaj tiel kontaktiĝi al la leĝoj de la vivo, tiamaniere altiĝante por la akceptemo de la estonta granda naskiĝo. (Vidu LB1 par. 109).

Ĉiuj homoj en la estonteco estos tre kreaj kaj estos grandaj artistoj en ĉiuj penseblaj kampoj. Ĉiu homo fariĝos geniulo en praktike ĉiuj artaj kampoj, kaj fine estos genia viv-artisto. La homoj estos feliĉaj kaj vivos en krea ĝojo, ili distros unu la aliajn danke al ĉiuj siaj geniaj kaj brilaj talentoj. Kiel viv-artistoj ili distros la proksimulon, kio ankaŭ signifas servi al sia proksimulo.

Martinus: “La kristanismo estas maniero de manifestiĝo, kiu ne perfektigis ĝis ĝi estos genieco en la konscio kaj kondukmaniero de la estulo. Ĝi estas ne malpli ol la plej granda arto kiu ekzistas, ĉar ĝi estas la vivarto mem. Vivadi estas arto de la plej altega grado. (La kreado de la kulturo, libro n-ro 24, ĉap. 16).

## 19. Kosma komunismo

Ĉapitro 4 de Livets Bog 1, *Internacia mondregno kreiĝanta*, iusence estas la granda politika manifesto de Martinus. La sama temo cetere estas diskutita en Livets Bog 4, kie li uzas la esprimon “kosma komunismo”, dirante ke “la evangelio de la komunismo” reale estas la Nova Testamento. (Vidu LB4 par. 1334).


Martinus skribas: “Jesuo de Nazareto, la fonto de la kernaj ideoj de ‘la Nova Testamento’, tiusence estas la unua kaj plej granda ‘komunisto’ de la mondo. Lia ecaro aŭ kondukmaniero prezentas la bildon aŭ modelon laŭ kiu la tera homo ŝanĝiĝos, estinte sklavo de la ‘falsa negoca principo’ kaj estonte genia plenumanto de la ‘vera negoca principo’, kiu kulminas en “pli feliĉe doni ol preni”, kaj danke al kiu dia kondukmaniero oni praktikos ĉian neniigon de la kontraŭsociaj amasiĝoj de materiaj valoroj favore al totala socia ekonomia ekvilibro inter ĉiuj ŝtatoj same kiel inter individuoj.” (LB4 par. 1333).

## 20. La dek du punktoj de Martinus pri la plenumo de la granda ordono de amo fare de la tera homo

1. Ĉiuj formoj de venko de la altruismo super la egoismo (la venko de la komuna intereso super la privata intereso).
2. Kreo de internacia demokratia monda regado.
3. Malarmado de ĉiuj landoj favore al establo de internacia senpartia monda polico.
4. Evoluigo de internacia malkaŝa - ne sekreta - plej supera leĝodona organo kaj justico kiuj, reprezentante la estulojn de la scienco plej elstarajn en spirita kiel ankaŭ en materiaj kampoj, povos esti kvalifikitaj distingi inter “abnormaj agoj” kaj “krimoj”, – konas la iradon de la evoluo kaj la eternajn leĝojn de la vivo, kaj tiel povos esti garantio de absolute perfektaj juĝado kaj justeco al ĉio kaj ĉiuj.
5. Abolo de privata posedo de la valoroj favore al ilia proprigo al la monda ŝtato.
6. Abolo de mono favore al la enkonduko de persone farita laboro kiel sola pagvaloro kaj de ties kvitanco kiel sola persona pagilo.
7. Establo de infana, maljunula kaj malsanula fonduso komuna por la tuta monda ŝtato surbaze de depagoj el la laborkvitancoj.
8. Utiligo de la maŝinoj por malplilongigo de la materia labortempo favore al studotagoj kaj spirita esplorado.
9. Abolo de ĉia violenta politiko kaj sangoverŝado.
10. Abolo de torturaj, bastonadaj kaj mortigaj punoj favore al spertobazitaj aranĝoj de internigo kaj edukado.
11. Evoluigo de vegetaraj nutraĵoj, de sano kaj korpoflegado, de sanaj kaj helaj loĝomedioj.

12. Evoluigo de spirita libero, toleremo, humaneco kaj amo al ĉiuj vivaj estuloj, al homoj kaj bestoj, al plantoj kaj mineraloj. (LB1 par. 117).

Fino de artikolo - parto 2/2. Pli da informoj en la libro “Martinus kaj la nova monda moralo”, [www.oletherkelsen.dk](http://www.oletherkelsen.dk). Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.



## Rezolucio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio

La 1.318 partoprenantoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniam lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.



Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto. Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

**1.** La civila socio en la gastiganta

urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.

**2.** Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

**3.** Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.

**4.** Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvin

kitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.

**5.** Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantiĝi al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, proklamitan en la jaro 1948.

**6.** Nun, en la jaro de la 75-a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

**7.** Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

*Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023*

Redonita laŭ permeso de revuo Esperanto, n-ro 9, 2023

## Informado pri la Martinus-instituto

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton.

La disvastiĝo de la konoj pri la Kosmologio de Martinus okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 3838 0100 Telefotempo: lundo-ĵaŭdo 12-16 DK p.ĝiro 642-9580

[www.martinus.dk](http://www.martinus.dk), [esperanto@martinus.dk](mailto:esperanto@martinus.dk), [shop.martinus.dk](http://shop.martinus.dk)

Redakcio: Ole Therkelsen. Kompostado: Jonas Dalmose.

Kopirajto: © Martinus Institut Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

Presita de Martinus Institut ISSN 1600 4116.



## SENPAGA EO-KOSMOS

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: [www.martinus.dk/eo](http://www.martinus.dk/eo).

Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron kaj epub-libron.

Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: [esperanto@martinus.dk](mailto:esperanto@martinus.dk).

Martinus-Instituto  
Mairendalsvej 94-96,  
DK-2000 Frederiksberg,  
Kopenhago,  
Danio